

STARTO

N-ro 4/2019 (273)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Foto Pavol Kaščák

La 17-a asocia kongreso
omaĝe al 50-jariĝo de ĈEA
okazis en Brno sub aŭspicio
de la ĉefurbestrino d-ino Markéta Vaňková

B | R | N | O

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz/redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:

Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gyidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumado, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admiŝtras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický, P. Dvořáková

KONGRESO DE ĈEA, BRNO, OKTOBRO 2019

La ĉi jara kongreso de ĈEA en Brno estis jubilea – kaj tre sukcesa! Eble vi, ĉiuj legantoj, scias, ke antaŭ 50 jaroj estis renovigita ekzisto de nia asocio, post kiam en la malhelaj kvindekaj jaroj tiama komunisma registaro devigis la tiaman asocion likvidi sin mem.



Do printempe en la jaro 1969 la Ĉeĥa Esperanto asocio reviviĝis. Okazis tio en Brno, en la Domo de societoj (Besední dům). Estis 400 ĉeestantoj.

Nia ĉi jara oktobra konferenco, eminente kaj zorgeme preparita de anoj de Esperanto-klubo en Brno kunlabore kun komitato de ĈEA, preparis vere buntan kaj interesan programon.



Sufiĉe multaj prelegoj havis diversajn temojn – slovakia diplomato Jozef Reinvarť kaj irlanda diplomato, prezidanto de EEU (Eŭropa Esperanto Unio) Seán Ó Riain

parolis pri projekto Esperanto kiel kultura heredaĵo, pri projekto de disvastigo de Esperanto en lernejojn, pri enkonduko de Esperanto en Eŭropan Union ktp.




La ceteraj parolantoj prezentis KER-ekzamenojn de UEA, UKon en Lahti 2019, historion de Esperanto-movado en Ĉeĥa Respubliko, personon de juna esperantisto Petr Ginz, pereinta en nazia koncentrejo, Internacian Junularan Esperanto-kongreson 2019, personojn Louis Braille kaj Hieronimo Lorm (blinda kaj surde-blinda homoj, gravaj por la aliaj, same handikapitaj), Esperanto-instruadon.



Tre interesa, kortuŝa, estis rakontado de 94-jara aŭstria esperantisto Martin Stuppniĝ, nekredeble vigla veterano de la 2-a mondmilito, en biblioteko de Mahen. Plena salono de ne nur esperantistoj, sed ankaŭ publiko, senspire aŭskultis pri liaj militaj travivaĵoj.

Okazis ankaŭ lanĉo de lia libro (ĉeĥa versio) Home en senhomeco = Vždy lze žít člověkem.

En la biblioteko de Mahen la anoj de EK Brno preparis videndan ekspozicion „50 jaroj de ĈEA“. Belaspekte, bone profesie preparita ekspozicio.



La partoprenantoj vizitis ankaŭ por esperantistoj signifoplenan Domon de societoj. Sperta ĉiĉerono parolis pri interesa historio de la domo kaj ebligis eniri balkonojn kaj spekti la koncertan salonegon, la saman, sed iom pli malgrandan ol tiu en Vieno. Do tie antaŭ 50 jaroj revivis nia nuntempa ĈEA. Kelkaj tiamaj partoprenantoj de la tiama solenaĵo estis inter nuntempaj vizitantoj.



Sabate kaj dimanĉe antaŭtagmeze okazis laborkunsido de partoprenantoj de la kongreso kun balotoj en novan komitaton de ĈEA. La komitato plimultiĝis je du anoj, do nuntempe ĝi estas denove sespersona.

Krom traktado kaj prelegoj oni ankaŭ amuziĝis – estis bela ekskurso al Slavkov – vizito de Tombomonto de Paco kaj muzeo de „batalo de tri imperiestroj“ (kiu de vi ne

konas la lokon, mi rekomendas viziti ĝin).



Sabate dum socia vespero oni dancis ĉe belsona muziko kaj amuziĝis ĉe multobjekta tombolo.

La kongreson vizitis 94 partoprenantoj enkalkulante gastojn el eksterlando: Slovakio, Aŭstrio, Germanujo, Pollando, Francujo, Hungario, Irlando kaj plej malproksime – Meksikio (18-jara tre simpatia studanto en Germanujo), do entute de 8 landoj.



La loĝado, manĝaĵoj, vetero, medio, programo de la kvar tagoj ... kio ankoraŭ ? ... ĉio sukcesis je noto EMINENTE!

LChal



Estis atribuitaj du honoraj membrecoj, al Libuše Dvořáková kaj Marie Čumová, ambaŭ el Svitavy, kiuj meritas pri la fondo de Esperanto-muzeo kaj nuntempa sidejo de ĈEA.

fotoj de P. Kaščák kaj O. A. Fischer

Bilancio de tri jaroj 2016 – 2019

Estimataj legantoj, karaj gesamideanoj,

permesu al mi alparoli vin en tiu ĉi antaŭkristnaska tempo kaj deziri al vi trankvilan adventon, tempon por trovi pli da tempo por viaj familianoj kaj gemikoj. Kaj por la venonta jaro mi deziras al vi speciale sanon kaj kontenton.

Kiel vi scias, ĉi-jare havas ĈEA 50 jarojn, do okazis en Brno kongreso de nia asocio omaĝe al tiu jubileo. Pli pri la kongreso vi povos legi je alia paĝo de tiu ĉi numero de Starto, mi volas nur danki denove al ĉiuj organizantoj kaj informi vin, ke en Starto vi povas nun legi Rezolucion de la kongreso kaj mian (iom plimallongitan) raporton pri lastaj tri jaroj. Pliajn raportojn el la kongreso ni publikigos en venontaj numeroj de Starto.

Ni en la estraron iris kun jenaj prioritatoj:

Unue: teni laŭeble ekvilibrantan buĝeton, due: Muzeo de Esperanto, trie: restarigi kunlaboron kun eksterlandaj E-organizoj.

Mi komencos per financoj: je tiu kampo ni ne estas tiel sukcesaj, kiel ni volus. Ni ne estis spertaj pri serĉado de subtenprojektoj kaj devis eklerni kaj serĉi kaj argumenti. Iam ni sukcesas, iam ne. Iom da mono ni tamen ricevis, ekzemple de hetmano de regiono Pardubice, de urbestro de Benešov, nun de ĉefurbestro de Brno kaj ni klopodas akiri subvencion de Sudmoravia regiono por la kongreso, sed ĉu ni sukcesos, ni ankoraŭ ne scias. La peno en tiuj projektoj estas granda kaj la sukceso ne certa. Al tio apartenas ankaŭ niaj klopodoj en Apogo Bachrich, kie ni ne

ricevas monon, sed ni ricevas librojn por nia Muzea biblioteko. Tie ni estis sukcesaj, danke al Mirek Malovec kaj Pavla Dvořáková, do ni ne devis elspezi monon por havi por ni interesajn librojn. La precizan financon raporton vi ricevos de nia kasisto V. Hirš.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: ĝi estas grava por la movado. Granda danko apartenas al la loka klubo kaj ĉiuj, kiuj laboras por la muzeo, ne nur en la muzeo mem, kiel konstruaĵo, sed iamaniere aliel por disvastigi aŭ ĝeneralajn informojn pri ekzisto de la muzeo aŭ ebligas akiri la kolektojn de la muzeo, prezentas movadan historion kaj Esperanton per ekspozicioj ekster la muzeo, kiel estis ekzemple ekspozicio de Viktor Dvořák en Senato de ĈR, ekspozicio *Ĉu estas Esperanto morta lingvo* (laste en universitato en Brno) kaj kiel nun estis ekspozicio en Mahen-biblioteko kaj kiun preparis kaj instalis geklubanoj de Brno kaj estis tie dum la tuta monato oktobro.

En la Muzeo mem estis dum nia oficperiodo tri ekspozicioj, 2 preparis Pavla Dvořáková kun loka klubo, la ĉi-jaran, la plej novan, loka klubo kun Miroslav Malovec, junularo kaj s-ano Heiser. Muzeo festis sian dekjariĝon.

Antaŭ la dekjariĝo okazis en la muzeo rekonstruo, kiu estis necesa, ĉar tie estis malsekaj muroj kaj en la spaco de muzeo ne estis akvo por uzo dum aranĝoj, do ĈEA aĉetis en muzeon kuirejon kaj jam tie estas instalita akvo. Dum tiu rekonstruo faris loka klubo multege da laboro, en kiu helpis ankaŭ anoj de klubo en Česká Třebová.

Do al ĉiuj apartenas granda danko.

Danko apartenas ankaŭ al Blanka Čuhelová, direktorino de la muzeo, kaj al urbestro de la urbo Svitavy sinjoro David Šimek, kiuj ambaŭ subtenas nin, kio por ni estas grava. Subtenon al esperanto kaj Muzeo en Svitavy esperimis sinjoro urbestro dum vizito en Muzeo ĉe malfermo de la lasta ekspozicio en septembro ĉi jare. Muzeo donacis librojn al Esperanto centro en Bjelovar.

Granda tasko, kiun ni havis kaj apartenas al niaj prioritatoj, estis sukcesi plilongigi kontrakton inter la urbo Svitavy kaj ĈEA pri muzeo. Mi povas informi, ke mi sendis peton pri plilongigo kaj ricevis informon, ke la kontrakto estas preparata, ke ĝi estos plilongigita por venontaj tri jaroj.

Problemo estas, ke ni ne sukcesas trovi pliajn kunlaborantojn, iun, kiu helpus al ni pli videbliki nian muzeon al fakaj instancoj eksteresperantaj.

Eksterlandaj kaj eksteraj rilatoj: unue mi volas danki al ĉiuj eksterlandanoj, kiuj alvenis por partopreni nian kongreson. Tio apartenas al eksterlandaj rilatoj kaj estas grava por ni ankaŭ pro tio, ke eksterlanda vizito ĉiam helpas al plibonigo de nia lingvokono. Ni povas praktiki la lingvon.

Nun al eksteraj, ne eksterlandaj rilatoj, nome al niaj rilatoj kun ĈEJ. Ekde konferenco en Kroměříž ili kunlaboras kun ni, partoprenas en niaj konferencoj, kongresoj, preparis partojn de la programo. Ni laboras je kontrakto kun junularo, sed tiu ne estis tiu plej grava. Grava estas, ke ili partoprenas en niaj aranĝoj kaj ankaŭ mi, kiel reprezentanto vizitis ekzemple ilian aranĝon Centrejo. Ĉi jare ili estis iom pli okupataj, ili laboris pro IJK en Liptovský Hrádok kaj multaj el ili havas finajn ekzamenojn en siaj univer-

sitataj studoj. Sed ili jam promesis esti pli aktivaj ekde venonta jaro kaj proponi eblecojn por kunlaboro.

Nun al eksterlandaj rilatoj – ni sukcesis restarigi bonajn rilatojn kun niaj najbaroj slovakoj, ni priparolis kunlaboron, volas ankaŭ fari formalan kontrakton pri kunlaboro kaj interŝanĝo de reprezentantoj de asocioj, sed sen tiu ni ankaŭ funkcias bone. Slovakoj venas prelegi al ni, ĉu al la kongreso, ĉu al Muzeo, mi prelegis pri Muzeo ĉe ili dum TER. Nun ili volas helpi al ni kun la propono de Esperanto kiel kultura heredaĵo, ili volas ricevi niajn konsilojn, spertojn rilate al E-muzeo. Vi scias jam, ke SES okazos en 2020 en ĉeĥa Kroměříž, do ĈEA helpas en organizado kaj Starto estos media partnero de la aranĝo. Do vi povas vidi, ke nia kunlaboro vere progresas, pro kio ni ĝojas. Dum la kongreso ni ankaŭ komencis priparoli kunlaboron kun niaj aŭstraj kolegoj kaj vi povis legi, ke la muzeo komencis kunlabori kun esperantistoj de la urbo Bjelovar.

Ankaŭ ĉi tie eble iu povus trovi mankojn, ekz. ke ni ankoraŭ ne faris la kontraktojn, ke ni ne faras pli da komunaj projektoj, sed ĉio ne dependas nur de la estraro, sed ankaŭ de ĉiuj vi, se vi pretas helpi diversmaniere.

Kaj nun io ekster kategorioj, pri kio mi volas paroli. Ni sukcesis post jaroj eldoni novan publikaĵon, nome Jarlibron de ĈEA. Ega dankon apartenas al la aŭtoro Miroslav Malovec. Iuj el vi eble trovos mankojn en ĝi, tamen tio estas granda sukceso kaj mankoj helpas fari venontan publikaĵon eĉ pli grandan kaj pli precizan danke al helpo de ĉiuj vi, kiuj havas la informojn, konojn pri historio de la movado.

Libuše Hýblová

Usnesení sjezdu

**Českého esperantského svazu, z. s.,
který se uskutečnil v Brně
ve dnech 17. - 20. října 2019**

Sjezd zvolil:

1. členy Výboru ČES pro volební období 2019-2022 ve složení: Libuše Hýblová – předsedkyně a statutární orgán, Jiří Tomeček – místopředseda, Leonarda Chaloupková – členka, Vratislav Hirš – člen a pokladník, Miroslav Malovec – člen a šéfredaktor Starta, Andrea Švubová – členka.

Sjezd schválil:

1. zprávu o činnosti ČES za období listopad 2016 až říjen 2019,
2. zprávu o hospodaření za období listopad 2016 až říjen 2019,
3. bodové zhodnocení tříletého období ČES,
4. udělení čestného členství ČES Marii Čumové a Ing. Libuši Dvořákové ze Svitav,
5. Pardubice jako místo konání příští konference a pověřil Výbor ČES zajištěním akce ve spolupráci s místním klubem.

Sjezd doporučuje:

1. všem členům ČES propagovat Muzeum esperanta ve Svitavách a podporovat jeho činnost,
2. klubům a sekcím dbát na každoroční aktualizaci svých údajů a dbát na provedení voleb svých orgánů v souladu se Stanovami ČES,
3. všem členům a klubům věnovat se studiu (opakování) esperanta a využívat možností jazykových esperantských kurzů a škol, které jsou pořádány v ČR i v zahraničí.

Sjezd vyzývá:

1. všechny členy a organizační složky spolupracovat s Výborem ČES na přípravách podání návrhu na zařazení esperanta jako nemateriálního kulturního dědictví ČR,
2. členy k větší aktivitě, k přispívání do Starta a na webové stránky ČES.

Sjezd bere na vědomí:

1. zprávu o činnosti složek ČES za období listopad 2016 až září 2019.

V Brně 20. 10. 2019

La nova asocia komitato



Libuše Hýblová – prezidanto

Jiří Tomeček – vicprezidanto

Vratislav Hirš – kasisto

Leonarda Chaloupková – komitatano

Andrea Švubová – komitatano

Miroslav Malovec – komitatano kaj redaktoro de Starto

Tute nova komitatano estas Andrea Švubová, antaŭe Hasalová, aktiva ĉe fervojistoj (filino de Vladislav Hasala).

Novaj honoraj membrinoj de ĈEA

Marie Ĉumová (naskiĝis en 1946) jam antaŭ ekesto de ĈEA korespondis kun eksterlandaj esperantistoj kaj kiam la asocio estis fondita en 1969, ŝi tuj membriĝis. Ŝi estas aktiva membrino de E-klubo en Svitavy kaj ekde 2008 vo-



lontula bibliotekistino de la ĈEA-biblioteko, lokigita en Esperanto-Muzeo en Svitavy. Ŝi enkomputiligis liston de pli ol 19 000 libroj kaj gazetoj, ĉe ĉiu unuo aŭtoron, titolon, traduk-

iston, eldoniston kaj eldonjaron kaj ĉefe – precizan lokon, kie ĝi estas fizike trovebla sur la bibliotekaj bretoj. Ĉar la libroj estas tro multaj, la urba magistrato disponigis unu grandan ĉambbron kiel deponejon en alia urboparto. Tie troviĝas grandaj bretaroj ĉe la muroj kaj kelkaj paralele starantaj meze de la ĉambro. Jam nun ili estas plenaj de skatoloj kun esperantlingvaj libroj. Plie ŝi zorgas ankaŭ pri tiel nomata Libro servo, la asocia librovendejo, kiu funkcias ankaŭ dum la asociaj kongresoj kaj konferencoj.



Foto Petr Chrdle

Inĝenierino **Libuše Dvořáková** (naskiĝis en 1953), estas iama estrino de E-klubo en Svi-



tavy. En 2008 ŝi iniciatis kaj ĉefprizorgas funkciadon de Esperanto-muzeo en sia urbo – kunpretigas ekspoziciojn, ĉiĉeronas por anoncitaj grupoj kaj

preparas aranĝojn por publiko (Marcipana Kristnasko, Muzea nokto, Tago de la eŭropa heredaĵo ktp.). Membrino de ĈEA ekde 1990, en 1995-2000 instruis Esperanton en la 6-a bazlernejo en Svitavy; en 2002-2005 estraranino de ĈEA, en 2008-2011 estrino de la kontrol-konsilio de ĈEA, en 2011-2016 vic-prezidantino de ĈEA, ekde 2016-2018 estraranino de ĈEA. Organizantino de E-aranĝoj (ĈEA-konferencoj en 2003-5, 2007 kaj 2009), Infanaj tagoj kaj regionaj renkontiĝoj en Svitavy k.a.). Kontribuas per artikoloj pri Esperanto al la loka gazetaro kaj al la ĈEA-gazeto Starto, kies distribuadon ŝi krome prizorgas kun sia klubo.



Martin Stuppnig diligentis en Ĉeĥio

*Ne ĉiu povas esti heroo,
sed ĉiam eblas resti homo.*
Johann Wolfgang von Goethe

De la 10a ĝis la 21a oktobro mia eldonejo KAVA-PECH havis estimatan gaston: la aŭstran humaniston kaj esperantiston Martin Stuppnig, veteranon de unu el la plej kruelaj bataloj de la dua mondmilito pri Monte Cassino kaj aŭtoron de la libro *Menschlich in der Unmenschlichkeit*, kiun KAVA-PECH eldonis en Esperanto kiel *Home en senhomeco* kaj komence de oktobro ankaŭ en la ĉeĥa kiel *Vždy lze zůstat člověkem* (Ĉiam eblas resti homo). La titolo, inspirita de J. W. Goethe bone respegulas la aventurojn priskribitajn en la libro. Al la ĉeĥa tradukis ĝin duopo de la tradukantoj Jindřiška Dubinová kaj Karel Kauer.



Martin Stuppnig estas al multaj ĉeĥaj esperantistoj konata. Ja tiu diligenta mondvojaĝanto partoprenis multfoje Esperanto-aranĝojn ankaŭ en nia lando. Mi tamen iom prezentu lin: Neniu, vidante lian korpan kaj psikan energion kredus, ke li jam transpaŝis sian 94an naskiĝdatrevenon, devenas de malriĉa familio kun 13 infanoj (Martin estas la

3a plej aĝa), devis aktive trapasi la militon kaj eĉ preskaŭ ne sukcesis savi sian vunditan kruron de amputo.



Sed sian vivoenergion li ne havas senmerite! Ekde decembro 1946, kiam li revenis el la militkaptitejo, li ĉiumatene komencas la tagon per gimnastiko: unue Kvin Tibetanoj kaj ĉiam ankoraŭ ion aldone. Kaj al tio ĉiutaga vigla marŝado de minimume kvin kilometroj. Mi mem povas atesti tion, ĉar kiam mi pasintjare en la ekumena kongreso en Poděbrady iris matenmanĝi ne plene vekita, kun ankoraŭ duone kungluitaj okuloj, mi renkontis Martinon almarŝanta deekstere. Mi do demandis, ĉu li hodiaŭ renversis sian kutimon kaj unue marŝis kaj nur poste gimnastikos, kaj li respondis, ke ne, li jam havas malantaŭ si ankaŭ la gimnastikon, kaj al tio kvin kilometrojn! Kaj ankoraŭ ne estis la oka!

Sed li ne estas aktiva nur korpe! Ja li ankaŭ nun aktivas politike, sindikate kaj kulture, kaj malgraŭ sia okulhandikapo li ankaŭ diligente respondadas la retmesaĝojn kaj intervenas dum multaj Esperanto-aranĝoj.

Sed post ioma prezento de Martin ni revenu al lia lasta restado en Ĉeĥio, kien li venis kiel gasto de mia eldonejo, por

helpi popularigi sian verkon. Li venis kiel ĉiam per trajno, ĵaŭde la 10an de oktobro, tranoktis en la pensiono U Tuláka (Ĉe vagabondo) en Dobřichovice kaj jam vendrede ni komune veturis al Kořenov por ĉeesti la konferencon de esperantistoj fervojistoj. Tie ni partoprenis la programon ĝis dimanĉe, kaj sabate posttagmeze li tie vigle prezentis sian libron al proksimume 40 ĉeestantoj. Lunde li memstare veturis al Nymburk, kie li vizitis la tradukistinon Jindřiška Dubinová, kaj marde jam denove prezentis sian libron, ĉi-foje en Praga humanisma gimnazio. Ĉar ni antaŭvidis partoprenon ĉefe de studentoj, ni ne faris al la aranĝo reklamon, nur invitis per retmesaĝo amikojn, ĉe kiuj ni supozis intereson. En la gimnazio ni estis afable invititaj de la direktoro, vicdirektorino kaj instruisto de historio kaj la latina, kiuj havis pri la renkontiĝo kun M. Stuppnig grandan intereson, sed bedaŭrinde intereso mankis ĉe studentoj. Partoprenis entute nur unu studento!



Ĉeĥe-germane interpretis la dua tradukinto Karel Kauer. Spite al la malgranda nombro de ĉeestantoj (proksimume 25 personoj) la atmosfero estis tre agrabla kaj neformala diskuto post la programo daŭris ankoraŭ longe.

Ĵaŭde matene ni forveturis al Brno por

partopreni la jubilean kongreson de ĈEA. Kaj vendrede posttagmeze okazis en la prelegsalono de la Mahen-biblioteko la lasta prezento de la libro de Martin Stuppnig fare de ĝia aŭtoro, ĉi-foje por publiko. Interpretis J. Dubinová kaj la intereso transigis ĉiujn niajn atendojn. La aŭtobuso kiu veturigis la kongresanojn el ekskurso havis malfruiĝon pro survoja ŝtopiĝo, do ni devis komenci sen ili, tamen jam tiam estis la salono kun pli ol 100 lokoj relative plena. Feliĉe post la alveno de la aŭtobuso eblis improvize aldoni pliajn vicojn de seĝoj, do neniu devis stari.



La aŭtoro post la fino de la programo diligente subskribadis sian libron, sed dume li kapablis respondadi pliajn kaj pliajn demandojn. La diskuto kun kelkaj restintaj interesiĝantoj estis tiel vigla, ke ni devis ĝin malvolonte ĉesigi, ĉar necesis prepari la salonon por sekvanta vespera programo.

Mi aldonu ankoraŭ iom pri la libro: en ĝi M. Stuppnig priskribas siajn aventurojn ĉe la fronto, kie li kiel 17-jara aŭstra junulo devis batali, post la anekso de Aŭstrio, „por la venko de la Tria Regno“, sed ankaŭ travivaĵojn en la brita militkaptitejo en Afriko kaj sian revenon hejmen 18 monatojn post la fino de la dua mondmilito.

Eble ne estas sen intereso, ke la libron mi eldonis pli rapide en Esperanto ol en la ĉeĥa. Sed mi subtaksis la popularecon de Martin Stuppniĝ inter esperantistoj kaj baldaŭ devis realigi la duan eldonon, kompletigitan laŭ la deziro de la legintoj pri ĉapitro koncize priskribanta la sekvan vivopason de la aŭtoro.



Sed la legantoj en Aŭstrio kaj Germanio skribis, ke ili volus tre volonte konatiĝi ankaŭ kun la germana originalo, kiu tamen ne plu estis je dispono. Ĉar ne estis espero, ke la germana versio estos reeldonita, mi decidiĝis, ke tiun duan germanan eldonon realigos mi (do ĉe KAVA-PECH la unuan), tamen, nur en tre eta eldonkvanto 150 ekzempleroj. Mi ja sciis, ke mi ne povas celi al la germana libromarkato kaj supozis, ke la celgrupo estos nur Esperanto-libroservoj, eĉ nur tiuj en germanlingvaj landoj. Tamen, 50 ekzemplerojn akceptis komisie ankaŭ mia librodistribuantino Kosmas kaj efektive kelkaj el ili estis jam venditaj ankaŭ en Ĉeĥio. Krome venis mendo ankaŭ de la UEA-libroservo kaj do el tiu germana eldono restas jam nur kelkaj ekzempleroj. Kaj mi ankoraŭ aldonu, ke tiu dua germana eldono fariĝis la bazo por la traduko ĉeĥen.

Petro Chrdle

Kelkaj momentoj el la kongreso



Ĉeĥan Esperanto-Junularon reprezentis Václav Zouzalík per prelego pri Internacia Junulara Kongreso en Liptovský Hrádok 2019



En la kongreso ne povis manki danc-amuzo kun tombolo



fotoj de P. Kaščák kaj O. A. Fischer

RAPORTO PRI INFORMA AGADO

raportas Pavla Dvořáková

1. La retejo Esperanto.cz

Dum la konferenco en Benešov demisiis la ĉefredaktoro Miroslav Hruška. Oficiale li transdonis la retejon al la prezidantino, tamen pro ŝia okupiteco pli grandan parton de liaj taskoj transprenis Pavla Dvořáková. La situacio certe havis influon al ofteco de novaĵoj.

Inter la du konferencoj aperis 19 ĉehlingvaj kaj 9 esperantlingvaj aktualaĵoj (en la antaŭa jaro 25 kaj 18). Krome M. Malovec plu zorgis precipe pri la historia subpaĝaro kaj M. Nárožný pri aranĝoj en Svitavy por la Kalendaro.

Laŭ Google Analytics la retejo havis dum la jaro ĉ. **15 mil vizitojn de proksimume 9 800 vizitantoj**. Kompare kun la antaŭ jaro **temis pri ĉ. 1 500 vizitoj malpli**.

74% legantoj estas el Ĉeĥio (je 4% malpli ol lastjare). Nur ĉ. **11% de vizitantoj venadas ripete**. Grava informo estas, ke jam 32% venis al la retejo el poŝtelefonoj, por kiuj tamen nia teknika malnova retejo ne optimumas.

Preskaŭ 70% venas ne rekte, sed surbaze de tema serĉado precipe en Guglo. Ĉ. 1 000 vizitoj okazis surbaze de ligiloj en Facebook, plejparte el la asocia paĝo tie.

2. Inter la aktualaĵoj plu aperadis la listo Superrigardo pri Esperanto en ĉehlingvaj amaskomunikiloj, lastatempe ankaŭ kun mencio de la slovakaj - kutime po du-tri monatoj (kun escepto de vintro 2019). Dum la lasta jaro estis trovitaj ĉirkaŭ **36 artikoloj** (je 6 pli ol en la antaŭa jaro).

El tio minimume 16 aperis tute sendepende de la aktiveco de niaj membroj. El ili aktivis precipe laŭalfabete Lenka Angelová kun Mirka Kosnarová, Jindřiška Drahotová, Libuše Dvořáková, Pavla Dvořáková, Leonarda Chaloupková, Petr Chrdle, Max Kašparů kaj Ladislav Kovář.

Ĉar la serĉado estas postulhava kaj ne ĉiam kompleta, aŭtoroj estas petataj informi pri siaj artikoloj ĉe redakce@esperanto.cz!

Menciindaj artikoloj en gravaj gazetoj estas precipe:

Václavjaková, Mária – [Esperanto šíří českou a slovenskou literaturu](#)

en la kultura gazeto *OBRYS-KMEN*

[Umělý jazyk esperanto: Lingvistická perla, která hýbe světem](#)

en la magazino *Epochplus.cz*

Barbora Jelínková – [Vášně jménem Wikipedie](#)

en la gazeto *TÝDEN* - inkluzivanta ankaŭ ĉapitron *Ĉio komenciĝis per Esperanto*.

3. El la listo estis ankaŭ aparte listigitaj radio- kaj televidelsendoj,

kiuj troveblas en la rubriko "O esperantu".

Ekde oktobro 2018 aperis **5 radioelsendoj** - el kiuj 2 realiĝis dank al aŭ kun ĈEA-membroj. Estis elsenditaj **7 televidaj programoj**, en kiuj kvinfoje rolis ĈEA-membroj. Menciindas ekzemple la klubo de Brno en la novembra programo de la Ĉeĥa televido.

4. Teknike kiel subpaĝaro de Esperanto.cz funkcias la dulingva muzea retejo Muzeum.esperanto.cz, kiun ekde 2011 post Jiří Tomeček redaktas Pavla Dvořáková. Lastjare plej granda laboro koncentriĝis al dokumentado de la 10-jariĝo de la muzeo. Pro ŝanĝo de labordivido en la muzea grupo nun ne optimume funkciis informado pri okazaĵoj en la muzeo mem, kio espereble baldaŭ solviĝos. Aperis **du novaj fotogalerioj pri kolektematerialoj el la jaroj 1918-1939 kaj 1946-1968**, kiuj estis origine pretigitaj por la muzea informa tuŝekrano. La retejo estas aktualigita en ĉiuj rubrikoj, atentinda estas precipe la biblioteka subpaĝo kun multaj retligiloj.

Tamen **la retejo jam malmoderniĝis kaj precipe komencas manki spaco, tial multaj malnovaj artikoloj ne plu videblas. Pro tio urĝas trovi kreanton de la nova retpaĝo**. Laŭ Google Analytics la paĝaro havis dum la jaro **proksimume 2 300 vizitojn de 1800 uzantoj**.

Kio nove ciferecigita?

Estis trovita manuskripto de radioludo **Frato de Prometeo** pri Tomas Alva Edison, verkita de Dalibor Chalupa, esperantigita de Theodor Kilian kaj elsendita de Verda Stacio la 7-an de oktobro 1936.

Vladimír Türk kun Jaroslava Malá plie prilaboris **Grekajn mitojn** de Eduard Petiška, kiujn ili ankaŭ laŭtlegas. Jaroslava Malá ciferecigis plurajn numerojn de **Medicinaj informoj-Sano**, Anna Gybasová de **Pacdefendanto kaj Paco** en la tempo, kiam ili estis nur stencilitaj, Andrea Švubová same prilaboras la **pragan bultenon**. En tiuj bultenoj troviĝas multaj interesaj kaj gravaj informoj pri nia movado antaŭ la estiĝo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato en 1959. Karel Votoček kontrollegis multajn tekstigitajn tekstojn kaj korektis mistajpojn. Jaroslava Malá regule kontribuas al **Ret-radio**, kie ŝi legas diversajn tekstojn kaj tiuj tekstoj estas tie ankaŭ skribitaj.

Nun nia grupo kolektas la verkaron de la forpasinta Josef Kavka.

Zamenhof - 160 jaroj

Nian Majstron ne necesas speciale prezenti al nia esperantistaro, sed ni dediĉu al li silentan rememoron, ĉar la 15-an de decembro 2019 pasis 160 jaroj de lia naskiĝo.

Eble plej bona omaĝo estus tralego de iu el liaj verkoj: *Malnova Testamento*, *Fabeloj* de Andersen, *Hamleto* de Shakesperare, *Revizoro* de Gogol, *Marta* de Orzeszkowa, *Georgo Dandin* de Moli-ero, *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe, *Rabistoj* de Schiller, *Rabeno de Baĥarah* de Heine, *Gimnazio* de Aleĥem aŭ elektu liajn *Lingvaj Respondoj* aŭ *Proverbaro*.

JUBILEANTOJ DE OKTOBRO, NOVEMBRO KAJ DECEMBRO 2019

Iva FISCHEROVÁ, Liberec
Jarmila RÝZNAROVÁ, Pardubice
Věra FRONKOVÁ, Pardubice
Vojtěch TESAŘ, Holýšov
Marie HASALOVÁ, Hodonín
Jindřich TOMÍŠEK, Říkovice
Jarmila KUSSÁ, Ostrava
František VYCHODIL, Ostrava
Alois KVAPIL, Zábřeh na Moravě
Josef ZAJÍČEK, Dubicko
Jaromíra MATÝSKOVÁ, Opava
Zdeněk ZÁVODNÝ, Brno
Marie MOUČKOVÁ, Ústí nad Labem
Pavel ZMRZLIAK, Přerov-Předmostí
Jan PETRŮ, Praha
Jaroslava MALÁ, Čichtice
Ing. Jan POSPÍŠIL, Praha
Pavel RAK, ilustristo

AL ĈIUJ JUBILEANTOJ NI DEZIRAS
BONFARTON KAJ FIRMAN SANON!



Nevidantoj renkontiĝis fine de oktobro en
Třeboň
kaj la 7-an de decembro en Olomouc

UEA LOBIIS POR ESPERANTO EN LA 40a ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO

La 40-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko okazis en Parizo de la 12-a ĝis la 27-a de novembro 2019. UEA estas neregistara organizo (NRO) en rilatoj kun Unesko de 1954 kaj tie havis siajn reprezentantojn sed ankaŭ ILEI kaj TEJO estis akceptitaj kiel observantoj.

Niaj delegitoj Barbara Despigny, François Lo Jacomo, Gilles Tabard, Julien Enselme kaj Renée Triolle faris sian eblon por lobii ĉe naciaj delegitoj en la salonoj, koridoroj, ĉemangĉe.

Konstateble estas, ke la pli maljunaj scias pri la internacia lingvo, aliaj kun intereso aŭskultas pri ĝi, ĝiaj valoroj por justa komunikado aŭ volas aŭdi, kiel ĝi sonas, des pli pro tio, ke malgraŭ la 6 oficialaj lingvoj regis la angla. Eĉ belga reprezentantino parolis angle, "ĉar la plimulto de la administraj dokumentoj estas nur en la angla".

Tio evidentiĝis dum debato pri "Malfermita scienco", kiam estis proponita surekrane la rezolucio pri tiu temo en la angla kaj la franca; sekve ankaŭ Rusio kaj arabaj landoj komentis aŭ proponis en la angla, ne en siaj lingvoj.

En la Pleno aŭdiĝis la portugala el la buŝo de delegitoj el Portugalio, Brazilo, Angolo kaj Orienta Timoro, kaj hinda el la buŝo de Hinda Unio. Klare sentiĝis la "imperiismo" de uzataj lingvoj, kiam delegito de Ukrainio "atakis" Rusion ... en la hispana!

Nur asocio de sciencistoj citis lingvo-diskriminacion en la debato pri "Malfermita scienco" kiam la politiko estas lasi neniun flanke, t.e virinoj kaj handikapitoj, neniam minoritatoj, eĉ dum tiu Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj.

La NRO-j disponis pri salono por lasi dokumentojn, renkontiĝi, informiĝi. Duan jaron sinsekve, UEA rajtis alparoli la Plenon. Pro foresto de junuloj, tion faris Lo Jacomo nome de UEA (vidu ĉe <https://www.facebook.com/ngounesco>.)

Bela pruvo, ke UEA estas konsiderata kaj bone taksata de la Ligkomitato Unesko-NROj.

Ni kontaktis diversajn delegaciojn por peti ilian subtenon por nia plua paŝo post eldono de "Kuriero de Unesko": la agnosko de Esperanto kiel nemateria monda heredaĵo.

Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

Unesko-kuriero en 2019



En la jaro 2019 aperis tri esperantlingvaj numeroj de la Unesko-kuriero kun la temoj:

- **Kiam vi trinkas akvon, pensu pri la fonto**
- **Reinventi urbojn**
- **La etikaj defioj de klimata ŝanĝo**

Ili estas senpage elŝuteblaj ĉe la UEA-retejo <https://uea.org>, rubriko Revuoj.

Esperantistoj-fervojistoj kunvenis en Kořenov

En tagoj de la 11-a ĝis la 13-a de oktobro 2019 okazis regula konferenco de la Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio en nordbohemia parto de Ĉeĥio surlime de Izera kaj Giganta montaroj en hotelo „Lesní chata“ Kořenov.

Dum kelkaj laborkunsidoj la gepartoprenantoj estis informitaj pri agado de la Asocio en la jaro 2019, aŭskultis novaĵojn el estrarkunsido de IFEF en Poznano kaj planojn por la venonta jaro. Dum la konferenco okazis ankaŭ kunsido de LKK, kie oni diskutis pri organizaj aferoj rilate al 73-a IFEF kongreso, kiu okazos en la jaro 2021 en Beroun.



Inter preskaŭ 40 gepartoprenantoj estis eksterlandaj gastoj el Pollando kaj Aŭstrio. Tre interesa estis prezento de ĉeĥa eldono de libro "Home en sen-homeco" fare de Martin Stuppniĝ kaj Petr Chrdle.

Sabata antaŭtagmezo estis dediĉita al vizito de muzeo de dentrada fervojo Tanvald – Kořenov, kiu situas en konstruaĵo de stacidomo Kořenov kaj en hejtigejo, kiu estis novrekonstruita dank' al Norvegaj fondusoj.

Tie nin surprizis unika dentrada vagonkombinaĵo „Jungfrauoch“ de Svisaj fervojoj, kiu antaŭ kelkdek jaroj veturis en Svisaj Alpoj kaj post finveturo estis donacita al la muzeo en Kořenov.



Dum la vespera programo estis projekciitaj fotografioj el la lasta IFEF kongreso en Malago kaj fakaj prelegoj ankaŭ tie prezentitaj.

Ladislav Kovář



Foto: Antaŭ la hejtigejo en Kořenov

Aŭtoro: Vít Stanovský

SES 2020 – historie unuan fojon en Ĉeĥio!

Jes ja, vi legas bone – la aranĝo SES (Somera Esperanto-Studado) okazos somere 2020 vere en Ĉeĥio! La historia urbo Kroměříž estos de la 18a ĝis la 26a de julio 2020 la gastiganto de tiu ĉi internacia, amiketosa somera Esperanto-lernejo.



SES 2019 en Nitra

Programo: La aranĝo havas tre riĉan programon – ne temas “nur” pri ordinara lernado de Esperanto. Kutime la programo de SES estas ege plena, intensa. Ĝi konsistas el kelkaj partoj:

- Antaŭtagmeze: instruado de Esperanto, kurso pri literaturo;
- Posttagmeze: ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.;
- Vespere: nacia kaj internacia vesperoj, koncertoj, karaokeo, diskoteko...

Ja kiu jam almenaŭ unufoje partoprenis, povas konfirmi, ke dum SES oni ne enuas :).

Instruado: estas esenca parto de la aranĝo – plejmulto ja venas ĉefe por plibonigi sian lingvo-nivelon! Kaj la [Esperanto-instruadon](#) gvidas dum SES ĉiam spertaj Esperanto-instruistoj en 6-7 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo. Aparte ekzistas kurso pri la Esperanto-literaturo kaj kulturo, kaj planata estas speciala

aldona kurso pri la tradukado de/al Esperanto.

Ekskursoj: ege gravas, por ke partoprenantoj ekkonu la urbon/regionon, landon, en kiu ili troviĝas. La plano estas okazigi tre buntajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo – ja la regiono estas tre riĉa je vidindaĵoj! Ili tiom abundas, ke ne sufiĉos unu SES, por povi ĉiujn viziti :). Planitaj estas 2 tuttagaj ekskursoj (tamen samtage, do vi devos decidi, kiun lokon viziti) kaj eĉ 4 duontagaj! Kaj se vi hazarde jam konas la vizitotajn lokojn, ne malgaju – ankaŭ dum tiuj ekskursaj posttagmezoj estos preparita bunta programo en la SES-ejo mem. Cetere – la SES-teamo ege ĝojas, ke la ĉefa respondeculino pri ekskursoj bonkore akceptis esti Libuše Hýblová – la ĈEA-prezidantino!



SES 2018 ĉe Štrbské pleso

Krom SES ankaŭ SEP!

Efektive, ne nur unu aranĝo okazos dum SES – nova evento kun la plia cifero naskiĝis ĉi-jare: **SEP (Somera Esperanto-Programado)** - la unua Esperanta [hackathon](#)!

Kio estas hackathon?

(Esperante kodummaratono)

“Hackathon”, kiun oni ankaŭ foje nomas kodumtago, kodumfesto aŭ kod-festo, estas fasona sprintec-evento, dum kiu programistoj kaj aliaj fakuloj de program-kreado, inkluzive de grafikistoj, interfaccfasonistoj, projektmanaĝeroj kaj aliaj, intense kunlaboras pri komputilaj projektoj.

La celo de kodummaratono estas krei funkciantan programaron aŭ aparataron fine de la evento. Kodummaratonoj kutimas havi specifan temon, kiu povas esti programlingvo, aplikaĵo, API. Foje limigoj entute ne estas. Fine de la evento oni prezentas sian projekton.

Programistoj ja ne mankas en Esperantujo kaj pro tio ni decidis organizi SEP-on. Dum 7 tagoj do oni programos, grafikumos kaj fasonos ĉiumatene.

Oni povas veni kaj krei propran projekton, teamiĝi kaj eĉ estos projektoj proponitaj de ni, kiuj estas elpensitaj tiel, ke ili helpu Esperantujojn.

- 7 tagoj
- Unu temo
- Programistoj, grafikistoj kaj profesiuloj de la tuta mondo
- Matena programado
- Venu kun propra projekto aŭ laboru pri iu proponita

Pliaj detaloj: <https://sep.ikso.net/>

Historio: SES ekestis en la jaro 2007 – tiam kun la celo omaĝi kaj rememori la 100-jariĝon de Esperanto-movado en Slovakio (ekde eldono de la unua lernolibro en la slovakaj lingvo en 1907, fare de Albert Ŝkarvan). Sekve la aranĝo pro ties taŭgeco iĝis tradicio – kun kreskanta partoprenantaro. Nun ĝi ĉiusomere ariĝas kutime ĉ. 180-220 homojn el 20-30 landoj.

La aranĝon kelkaj partoprenantoj opinias “La plej bona EO-evento entute”. Ne estas ni-organizantoj, kiuj rajtus tiel fanfaroni pri ĝi (tiam la konstato povus “malbonodori” per memfiero). Sed tamen ni-organizantoj tre volonte invitas vin – eblajn partoprenantojn aliĝi kaj ĉeesti SES 2020 – por ke vi povu mem konvinkiĝi, ĉu la aranĝo estas vere tiom bona, kiel kelkaj asertas :). Ni certe faros ĉion por tio, por ke vi estu kontentaj kaj volu reveni al la onta SES!

Kion diri fine? Eble nur rekomendo: nepre aliĝu laŭeble rapide – la lokoj estas limigitaj. La organiza teamo de SES 2020 jam malpacience atendas vin! :) Helpu al ni fari la ĉeĥan SES 2020 neforgesebla!

Jen do, pri kio temas SES:

- Lernu kaj praktiku Esperanton
- Ekkonu homojn el diversaj landoj
- Amuziĝu dum bunta taga kaj vespera programo
- Malkovru Ĉeĥion
- Ĝuu la etoson de Esperantujo



Detaloj (baldaŭ ankaŭ kun la aliĝilo) troveblas ĉe: <https://ses.ikso.net/>
PS: ĉu vi emus helpi al ni organizi la aranĝon? Bv. kontakti nin ĉe ses@ikso.net

Peter Baláž (Petro)
E@I-kunordiganto
SKEF-prezidanto

SESA INTERNACIA ESPERANTO-LERNEJO EN BARTOŠOVICE

Ĉarma kastelo de Bartošovice (urbeto en norda Moravio, proksime de Ostrava) gastigis la duan semajnfino de novembro ĉirkaŭ dudekon da partoprenantoj de la Sesa internacia lernejo de Esperanto.



La organizantoj bonvenigis la partoprenantojn per bongustaj kuketoj, torto-tranĉaĵoj, punĉo, teo, kafo ...

La ĉeestantaro estis internacia, ĉar krom slovakinoj Fejfi (lerta Esperanto-instruistino) kaj Jana kun aŭstra amiko Rolland partoprenis ĉinino Li, rusino Darja kaj francino Lea. Venis eĉ raraj gastoj – Max Kašparů kun edzino Marika.

La taga programo estis vere bunta: antaŭtagmeze okazis lingva seminario – gramatika, gvidata de Fejfi, kaj konversacia kun Mirek Malovec. Posttagmeze estis libera programo – promenado tra la urbeto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo aŭ vizito de kafejo aŭ interbabilado en societa ĉambro aŭ „nura“ ripozo en bone ekipitaj loĝoĉambroj.

Vendrede vespere okazis vere impresa aranĝo – koncerto de artistoj de Nacia teatro de Prago: operkantistino Vanda Šířová prezentis kelkajn ariojn de Esperanta opero Sternenhoch ĉe elektronika muzikakompano de komponisto Ivan Acher. Fine de la koncerto, kiun vizitis eĉ neesperantista publiko, Vanda kantis arion de luno el opero Najado de Antonín Dvořák.

Nekredeble kortuŝa momento por ĉiuj spektantoj, nefiniĝanta aplaŭdo.



La artistoj kun la urbestrino

La saman vesperon prezentis Li Huang ritualon de preparo de teo – ambaŭ antaŭe nomitaj artistoj ankaŭ ĉeestis kaj la teo-programo kaj la Esperanto-medio tre plaĉis al ili. Sekvantan tagon ili jam devis forveturi en Pragon.



Alian vesperon okazis prezentado de mallongaj filmoj kaj lumbildoj de temo Teo, filmitaj de Pavol. Oni elektis la plej plaĉajn teo-bildojn por venonta ekspozicio en Esperanto muzeo en Svitavy.

La Sesa internacia lernejo ... sukcesis. Ĉio – interesa programo, komforta loĝado, bongusta manĝado, vetero – ĉio helpis por agrabla paso de la aranĝo.

Koran dankon al vere sindonaj organizantoj – Pavol Kaščák, Rost'a Ĉubok kaj iliaj helpantinoj Libuše Dvořáková kaj Li el Svitavy. Koran dankon ankaŭ al urbestrino, kiu estas favora al la Esperanto aranĝoj en sia urbo!

*LCha
fotaj P. Kaščák*

Esperanto-vizito de Berlino

Post pluraj jaroj mi vizitis komence de novembro Berlinon, kie atendis min du agrablaj programoj:

Lunde la 4an vespere mi prelegis en la *Esperanto-butiko*, sidejo de la Germana Esperanto-Asocio, pri la vivo kaj verko de Bertha von Suttner, la pragdevena unua ina Nobelpremiito pri paco, kaj prezentis krom mia verko pri ŝi *Sen laco por paco* ankaŭ aliajn librojn de mia eldonejo KAVA-PECH. Kvankam mia prelego estis ununura tiuvespera programo, la malgranda salono estis plena kaj post la programo ni ankoraŭ restis en amika interparolo.



Impresis min perfekte parolanta junulino Jessica Grasso, kiu aĉetis mian libron kaj klarigis la kialon, ke ŝi jam tralegis pro Esperanto-sumoo ĉiujn esperantajn librojn, kiujn ŝi posedas, do jen ĝi estos por ŝia sekva Sumoo-lukto.

Merkrede la 6an posttagmeze mi ĉeestis la solenan feston okaze de la 40-jara jubileo de la Esperanto-grupo Berlin-Lietzensee, kun vere riĉa programo. Mi salutis nome de ĉeĥaj esperantistoj kaj precipe de la Esperanto-muzeo, kies prospektojn mi disdonis al interesiĝantoj kaj en la germana, kaj en Esperanto, kaj invitis ilin al Svitavy. Krome mi havis prezentaĵon de la novaĵoj de mia eldonejo.



La ĉefa kontribuanto estis Hans Moser, la fondinto de la klubo, kiu ĝin gvidas la tutajn 40 jarojn ĝis nun. Li prezentiĝis kiel perfekta pianludanto kaj en la ĉefprelego riĉe akompanata per bildoj li resumis la 40-jaran agadon de la klubo, ene de kiu li menciis ankaŭ la grupan ĉeeston de la klubanoj en Prago pro la UK 1996 kaj emfazis sian viziton de Eo-aranĝo en Svitavy, kie la Esperantomuzeo kaj la agado ĉirkaŭ ĝi tre impresis lin, kaj rememoris, kiel ankaŭ li kontribuis al la programo per sia pianludo.



Pluraj berlinaj esperantistoj partoprenis kaj mian lundan prelegon, kaj la merkredan solenaĵon, inter ili ankaŭ la GEA-prezidanto Ulrich Brandenburg (sur la bildo la unua dekstre)

Petro Chrdle

Mia Esperanto-sumoo

Ĉi-jare printempe mi eksciis pri interesa projekto – Esperanto-sumoo. La japana esperantisto Hori Jasuo inspiriĝis de la tradicia japana sporto, strebante plialtigi intereson pri esperanta literaturo. Sesfoje jare, ĉiam dekkvin tagojn, esperantistoj povas batali kontraŭ sin mem legante libron en Esperanto. Kiam iu aliĝas al ĉi tiu konkurso, por venki li aŭ ŝi devigas sin tralegi ĉiutage dum 15 tagoj mem fiksitan nombron de paĝoj de esperanta libro.

Mi ekĝojis! Finfine aperis bona okazo tralegi iun libron el tiuj, kiuj ripozas en mia biblioteko. Unuafoje mi aliĝis kun la libro pri Francisko Valdomiro Lorenz. Tamen, kvanam mi ĉiutage ne venkis, do ne tralegis tiom da paĝoj, kiom mi devigis min, la projekto ekplaĉis al mi. Mi promesis al mi mem, ke venontfoje mi denove partoprenos kaj estos pli diligenta. En la sekva konkurso de Esperanto-sumoo mi elektis la libron „Sen laco por paco“ de Petr Chrdle. En la libro temas pri la vivo kaj verko de Bertha von Suttner (1843-1914), kiu ricevis en la jaro 1905 kiel unua virino Nobelpremion pri paco.

Ŝi naskiĝis kiel grafino Kinsky en Prago, fariĝis influa ĵurnalistino kaj verkistino kaj famiĝis per la verko „For la batalilojn!“, kiu restis ŝia ĉefverko. La esperanta traduko aperis en la jaro 1914 kaj la duan fojon ĉi-jare en la eldonejo KAVA-PECH. La libro konatigas la legantojn kun la eksterordinara vivo kaj agado de Bertha von Suttner. Ŝi batalis ne nur por paco, sed ankaŭ por la virinaj rajtoj kaj kontraŭ antisemitismo. La aŭtoro priskribas aventurplenan vivon de tiu admirinda virino de juneco, ŝian

interkonatiĝon kun Alfred Nobel, spiritan maturiĝon, engaĝiĝon en pacmovado kaj aliajn gravajn okazaĵojn de ŝia vivo.



En la libro mi eksciis ankaŭ pri ŝia privata vivo, la reciproka amo kun la edzo Artur von Suttner. Ili ambaŭ rifuzis la vivomanieron de la alta socia tavolo, al kiu ili apartenis, kaj sekvis siajn ideojn. Post sekreta geedziĝo ili forvojaĝis por 9 jaroj al Kaŭkazo. Estas menciitaj multaj eminentaj personoj, kun kiuj Bertha von Suttner kunlaboris kaj fine de la libro troviĝas aldonaĵoj pri familio Kinsky, Alfred Nobel, kaj Alfred Hermann Fried, eldonisto, ĵurnalista kaj Nobel-premiito pri paco, la plej proksima kunlaboranto de Bertha von Suttner.

Danke al tiu ĉi libro mi venkis en la Esperanto-sumoo, ĉar mi tralegis la libron en unu spiro kiel streĉan romanon. Kvankam temas pri faka literaturo, ĝi estas skribita en bone komprenebla lingvo. Mi eksciis multe da interesaĵoj pri la historio de pacmovado kaj sciiĝis, kiel grave estas rememorigi sensensecon de militoj, strebi pri daŭrigo de paco kaj subteni la ideojn de Bertha von Suttner.

Kaj nun mi komencis mian jam trian lukton. Post la aŭskulto de interesege rakontado de Martin Stuppniĝ mi elektis lian libron Home en senhomeco.

Mi rekomendas la Esperanto-sumoon al ĉiuj esperantistoj, ĉar per la legado oni povas certe plibonigi sian lingvan scion.

Jitka Tyšerová

La liberiĝo

estas nova romano de Éva Tófalvy. La nova libro verkita hungare kaj esperante (ambaŭ estas originaloj) rakontas pri Ĉeĥoslovakio en la Husák-tempo.



La protagonistoj de la romano *La liberiĝo*, la hungara Lili Pataki kaj la ĉeĥa Ota Krátký interkonatiĝas en unu internacia junulara esperantista renkontiĝo en 1976. Ili ambaŭ ŝatus liberiĝi el la kaptilo de la socialismo reganta en iliaj hejmlandoj. La amo de la gejunuloj ekfloras en tiu historia periodo, kiam en Hungario la tielnomata „malmola diktaturo”, en Ĉeĥoslovakio la Husáka „normaligo” difinis la vivon de la civitanoj.

Laŭ la dialogoj de Lili kaj Ota sursceniĝas la estinto, kaj en tiu du gravaj datoj: 1956 kaj 1968. La ekzemplo de herooj de la hungara revolucio kaj la Praga Printempo malgraŭ la venko de la subpremantoj kuraĝigas la gejunulojn, kaj donas al ili esperon batali por la libereco. Ili por la lukto provas trovi apogon unu en la alia kaj en ilia amo. La agado de la romano, kiu trapasas la landlimojn, rolas en Budapeŝto kaj en Prago.

La streĉa kaj interesa verko prezentas ne nur la baraktadon de la geamantoj por la libereco, sed ankaŭ montras fidelan bildon pri la vivo en la antaŭlasta jardeko de la socialismo en Mez-Eŭropo.

Ĝi ampleksas 240 paĝojn, en formato A5. Prezo 17 Eŭrojn (proksimume 450 Kč). Vi povas mendi ĝin en la jena adreso: akvila.priscilla@gmail.com, aŭ en mesaĝo en FB kaj Messenger:

<https://www.facebook.com/tofalvyeva>.

-et-

ALIĜU ANKAŬ AL LA ESPERANTA SUMOO!

La projekto estis iniciatita en 2008 de s-ro Josi HARUO el Japanio kaj ĝis nun partoprenis en ĝi ĉ. 10 mil interesitoj el plurdek landoj. Inspirite de la nacia luktosporto sumoo, ĝi okazas kvinfoje jare en malparaj monatoj dum 15 tagoj. La ĉefa celo estas altigi legokapablojn de esperantistoj kaj kutimigi ilin **legi librojn regule kaj kun ĝojo**. Ĉiu elektas laŭ sia plaĉo libron kaj nombron de paĝoj, kiujn oni ĈIUTAGE legas (egale ĉu 1 aŭ 10). Same kiel en la sporta sumoo, ĉiu luktas kontraŭ si mem - kontraŭ sia pigreco, nekoncentriteco aŭ nekonsekvenceco.

Komenco de sekva luktado estas la 10-an de januaro 2020.

Ĝis tiam vi povas aliĝi ĉe

horizonto@water.sannet.ne.jp.

Skribu vian luktantan kromnomon, devenlandon, aŭtoron kaj titolon de la libro kaj nombron de paĝoj, kiujn vi planas ĉiutage legi. Al via retadreso vi ricevos kontakton al via kunordiganto. Al li/ŝi la 5-an, 10-an kaj 15-an tagon vi sendos rezultojn de via luktado. Ĉiu kontrolas sin mem kaj informas laŭvere laŭ sia konscienco.

Vi povas aliĝi ankaŭ al la grupo [Esperanto-Sumoo en Facebook](#).

Pli da informoj troveblas en <http://www.esperanto-sumoo.pl>.

aŭ en la ĉeĥlingva artikolo en [Esperanto.cz](#) el 15.3.2019.

Pavla Dvořáková

LOUIS-CHRISTOPHE ZALESKI-ZAMENHOF

(1925-2019)



L. C. Zaleski-Zamenhof naskiĝis la 23-an de januaro 1925 en Varsovio kaj mortis la 9-an de oktobro 2019 en Parizo. Li estis doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, aparte pri premŝtalbetono.

La nepo de L. L. Zamenhof estis filo de Adam Zamenhof kaj Wanda Zamenhof, naskita Frenkiel; la personan nomon li ricevis honore al sia avo, Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Li estis Honora Membro de UEA.

Li studis en Varsovia Politekniko 1946-49 kaj diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, sekve doktoriĝis pri teknologio de streĉbetono. En 1959 li translokiĝis al Parizo kaj daŭrigis sian profesian karieron en Francio kaj aliaj landoj, realigante konstruaĵojn sur tero kaj maroj. Lia alia kampo de laboro estis didaktiko en la Arkitektura Altlernejo en Parizo kaj Politekniko de Milano. Li publikigis multajn artikolojn kaj librojn pri sia fako. Post la emeritiĝo en 1993 li okupiĝis pri faka konsultado, ĉeestis sciencajn konferencojn kaj kongresojn, inkluzive de Esperanto-kongresoj.

Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof edziĝis en 1949 kun Krystyna Tyszka, kiu naskis du filinojn: Hanna (1953) kaj Margaret (1958). Li havis nepinon Klementina Zamenhof-Zaruski kaj nepon Pierre-Louis-Antoine Lebard.

Li loĝis en Parizo kun la edzino Juliette, naskita Sekrecka. Li parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan. Li havis la francan kaj polan civitanecojn, estis honora urbano de Bjalistoko.

En 1934 la 9-jara Ludoviko esprimis la deziron partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Liaj gepatroj asertis, ke partopreni en Esperanta kongreso, sen koni tiun ĉi lingvon, mistrafigas la celon. La filo helpata de siaj onkloj Zofia Zamenhof kaj Lidia Zamenhof entuziasme eklernis kaj ekposedis flue la lingvon internacian. Tiel komenciĝis lia nova rolo de la „eta princo” dum laŭvicaj Esperantaj kongresoj. Li iĝis objekto de interesiĝo por la kongresanaro: en Stokholmo – 1934, en Romo – 1935, en Vieno – 1936 kaj en Varsovio – 1937, kie li nome de la familio Zamenhof,

salutis la kongresanojn. Septembre 1939 la germanaj aviadiloj bombardis Varsovion. La domo ĉe la Królewska-strato 41, en kiu loĝis la familio Zamenhof, estis komplete detruita. Tiam Ludoviko estis nur 14-jara knabo.

En 1987 Varsovio, kiel „lulilo de Esperanto”, estis ĝusta loko por celebri la centjaran jubileon de la lingvo internacia. La 72-a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Pollando evidentiĝis la plej granda en la historio de la movado. Ĝi allogis 6 mil partoprenantojn, sen kalkuli proksimume unu milon da gastoj, kiuj alvenis sen la formala aliĝo el Sovet-Unio kaj el aliaj t.n. socialismaj landoj. La direktoro de UEA, Simo Milojević, sukcesis trovi en diversaj landoj de la mondo sep membrojn de la Zamenhofa familio, kiuj alvenis kiel honoraj gastoj, inter ili Louis Christophe Zaleski-Zamenhof kun la edzino Juliette. Li, kiel la nepo de la kreinto de Esperanto, varsoviano kaj monde renoma konstruisto de „artefaritaj insuloj” sur maroj kaj oceanoj, montriĝis aparta atrakcio por ĵurnalistoj, sed ankaŭ por la kongresanoj.

Louis C. Zaleski-Zamenhof, reaperinte en la movado post dudekjara paŭzo, jam firme restis en ĝi. Li engaĝiĝis en la popularigon de la lingvo internacia kaj ĝia ideo per siaj intervjuoj por amaskomunikiloj. Li ankaŭ renkontiĝadis kun esperantistoj, kion respegulas la filmo aperinta en la Pola Televido s.t. „Śladami Dziadka” (Spuroj de la Avo). En ĝi la nepo estas montrita en kelkaj lokoj, ligitaj kun lia avo Ludoviko Zamenhof.

Bjalistoko iĝis ofta vizitcelo de L.C. Zaleski-Zamenhof. En la jaro 2000 li akceptis simbolan diplomon pro la fakto, ke lia avo Ludoviko Zamenhof gajnis la unuan lokon en la plebiscito por „Bjalistokano de la 20-a jarcento”. En la jaro 2007 li estis nomita honora urbano de Bjalistoko apud 14 aliaj distingitoj, inkluzive de Józef Piłsudski kaj Lech Wałęsa. Li plurfoje vizitis Bjalistokon kiel membro de la Fondumo Zamenhof respondeca pri la konstruo de Zamenhof-Centro.

Laŭ Gazetaraj komunikoj de UEA

Julia Isbrücker-Jaro 2020

Invito al kunlaboro

2020 estos la 100a datreveno de la 12a Universala Kongreso en Hago (1920). Julia Isbrücker (kun-)organizis ĝin. La realigo de tiu kongreso pravas, ke ankaŭ granda milito ne povas neniigi nian lingvon. Julia (kun-)fondis Internacian Esperanto-Instituton IEI kaj Universalan Ligon UL kaj (kun-)eldonis la metalajn Stelo-monerojn, kies nominalo estas unu, 5, 10 kaj 25 Steloj.

Sur la 100-Stela monero 2018 aperis viro: René de Saussure, la inventinto de la universala mono Spesmilo. Tial sur la 50-Stela aperu virino. 2020 mi planas eldoni arĝentan 50-Stelan moneron - simila al la Maria Theresia-Taler - por la honoro de Julia.



Mi jam kolektas materialon pri Julia. Ekzemple oni povas tiun materialon uzi por vikipedia artikolo. La ekzistanta artikolo pri Julia ĵus tradukiĝis en la persan.

La kolektita materialo aperos kaj en la formo de vikipediaj artikoloj en diversaj lingvoj kaj kiel broŝuro.

Bonvolu sendi al mi tekstojn kaj fotojn de kaj pri Julia. En la fina eldonaĵo via nomo estos menciita.

Walter Klag
esperanto@chello.at


Novaj libroj

Pri la 50-jariĝo de ĈEA aperis broŝuro de Miroslav Malovec **Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la jaroj 1969-2019**, eldonis ĈEA, 133 paĝoj, prezo 150 Kč ĉe Libroservo de ĈEA:

marie.cumova@seznam.cz



Novan broŝuron pri la naturo verkis kaj eldonis proprakoste Oldřich Arnošt Fischer: **Ekkompreni neparolantojn**, ĉi-foje pri birdoj kaj bestoj (antaŭaj broŝuroj estis dediĉitaj al insektoj). 107 paĝoj, prezo 180 Kč ĉe la kluba butikoj de Brno: <https://butikoj.esperantobrna.cz>



Petro Chrdle verkis kaj eldonis biografion de Bertha von Suttner **Sen laco por paco**, kiu montras, ke ŝi faris por paco multe pli ol nur libron **For la batalilojn!**, kies esperantlingvan tradukon KAVA-PECH antaŭ nelonge reeldonis. 159 paĝoj, prezo 227 Kč. Facila, bone legebla stilo.

1-a AŬTUNA ESPERANTO-KUNVENO EN HUMPOLEC

La trian semajnfino de novembro okazis Esperanto-kunveno de nemultaj esperantistoj en belaspekta kaj vizitinda urbo Humpolec.



Dum la tri tagoj la partoprenantoj promenantante trarigardis la urbon, vizitis ekspoziciojn de moderna arto en urba info-centro kaj galerio Oko (ĉeĥe Osmička).



Dank' al malgranda nombro (entute 4) da partoprenantoj, la organizantino de la kunveno, Milada Zemanová, povis per sia aŭtomobilo translokigi la geamikojn al Lipnice nad Sázavou por rigardi monumenton de Jaroslav Hašek kun Esperanta surskribo, viziti Esperantajn amikinojn en ilia bieno kaj spekti urbon Pelhřimov kun ĝia fama muzeo de kuriozaĵoj.

Kompreneble oni ankaŭ sufiĉe multe klopodis konversacii en Esperanto.

Oni ĝuis komfortan loĝadon en hotelo Sur

Naĝejo, gustumis bongustan kaj samtempe ne tro multekostan manĝon en urba restoracio kaj unuvorte travivis belan, amikan E aranĝon.

Dankon al vi, Milada!

Lcha

AEH kaj Esperanto-rondeto de d-ro Josef Hradil Mladá Boleslav invitas vin al la jubilea

50-a Lingva Seminario,

okazonta ĉi-foje ne en Skokovy,

sed en la [hotelo Kavka](#)

en **Malá Skála** u Turnova

en la tagoj **26. – 29. 3. 2020.**



La seminario estas destinita por komencantoj kaj progresintoj. Aliĝilojn kaj informojn petu ĉe AEH: Lenka Angelová (tel. + 420 775 323 903, aeh@esperanto-aeu) aŭ ĉe la klubo:

Jindřiška Drahotová (tel. +420 720 652 320, drahotova@esperanto.cz)

aŭ simple enrigardu la retejojn

<http://esperanto-aeu>

www.mlboleslav.cz/esperanto



Jarmila Rýznarová - 90

Pri la honora membrino de ĈEA kaj eksprezidantino de AEH ni jam informis en Starto plurfoje, ĉiam post kvin jaroj, sed ĉar ŝi daŭre aktivas en la movado, eblas informi pri ŝiaj laboroj en la lasta jarkvino.

Ŝi prilaboris biografion de F. V. Lorenz kaj tial estis invitita kiel honora gasto ĉe inaŭguro de la memortabulo sur la biblioteko en Vrdy, kiam ĝi akceptis la nomon Biblioteko F.V.L.



Ŝiaj artikoloj aperas ankaŭ en la brazila almanako Lorenz (ekz. Opinio, Mia unua vojaĝo okcidenten, La vivo plena de muziko). La lasta artikolo rakontas pri la vivo de ŝia onklino Vlasta Urbanová, operkantistino de Nacia Teatro en Prago.

Per la sama artikolo, sed ĉeĥlingve, ŝi kontribuis ankaŭ al Nacia Kroniko, ĉeĥlingva projekto por senioroj, kie ili povas skribi siajn rememorojn aŭ aliajn interesaĵojn, kiuj meritas ne esti forgesitaj. Jarmila tie priskribis ankaŭ detalan historion de Urban-familio kaj ne forgesis mencii Esperanton.

Ni povas nur rekomendi al aliaj esperantistoj kontribui al la projekto ĉe <http://old.sensen.cz/narodni-kronika>

Jindřich Tomíšek – 80

La honora membro de ĈEA Jindřich Tomíšek atingis la 14-an de novembro 2019 sian 80-jariĝon en plena aktiveco.



Vicprezidanto de OSŽ Vladislav Vokoun gratulas al la jubileulo

Li estas konata kiel fervora fervojisto, prezidanto de nia IFEF-sekcio, kiu regule dissendas informojn *El fervoja mondo* kaj *Trajne por travivaĵoj* al IFEF-membroj. Per ili li informas pri novaj lokomotivoj, vagonaroj kaj trakoj en la tuta mondo kaj invitas al interesaj ekskursoj en nia lando aŭ proksima eksterlando. Kelkcent liaj artikoloj aperis ankaŭ en gazetoj eksterlandaj kaj ĉeĥlingvaj.

Plie li estas aktiva IKUE-ano.

Li studis Fervojan teknikumon en Česká Třebová kaj poste laboris pli ol 40 jarojn kiel trajnekspedisto.

Esperanton li lernis kiel aŭtodidakto laŭ la kurso en gazeto *Anděl strážný*.

Eĉ en alta aĝo li ankaŭ sportas, kio certe donas al li freŝan aspekton.

Al ambaŭ jubileuloj ni gratulas.

KLUBA VIVO

Brno: La 7-an de novembro 2019 atingis s-ro Zdeněk Závodný sian 90-jariĝon, kion li festis la 17-an de novembro en la Viena Muzeo kune kun la klubaj prezidanto kaj vicprezidanto. Tra la muzeo tre volonte akompanis estro de la planlingva kolekto s-ro Bernard Tuidar.



La transporton prizorgis per sia aŭto la nepo de s-ro Závodný, Jakub Černý, kiu sube sidas apud sia avo en la legĉambro.



Fotoj J. Černý kaj M. Kolka

Písek: Pro pluraj gravaj kialoj tradicia AnkRo (Antaŭkristnaska Renkontiĝo) ne plu okazis. Tamen la 14-an de decembro la klubo organizis kontraŭ simbola enirpago publikan adventan koncerton en la dekana preĝejo omaĝe al 200-jariĝo de la loka komponisto, pedagogo kaj ĥorestro František Gregora (1819 – 1887).



La aŭspicion kaj financon kovron transprenis Muzeo de la Regiono Prácheň. La aranĝo estis oficiale dediĉita ankaŭ al rememoro pri la eksa prezidantino de la klubo [Radka Křivánková](#) (1932 – 2019).

Danke al vasta reklamo estis videbligitte, ke Esperanto plu ekzistas kaj ankaŭ iel utilas por la loka komunumo. Jen inspira ideo ankaŭ por aliaj urboj.

Prago: En la klubejo 31.10. okazis prelego de Petr Chrdle pri la vivo kaj verkaro de [Bertha von Suttner](#) kaj pri lia libro pri ŝi. – 28.11. Vlasta Pištíková rakontis pri Esperanta ekskurso tra [Sicilio](#). – 2.12. realiĝis Kristnaska kaj Zamenhofa vespero, tradicie ligita kun vizito de la Esperanto-monumento en Vyšehrad. – Aperis du novaj numeroj de senpage elŝutebla [Praga bulteno](#). – Pliaj aranĝoj realiĝis kadre de la klubo [E-mental'](#).



LINGVA ANGULETO - decembro 2019

En la pasinta LA jam estis dirite, ke ni ne celas en la instruado de la Lingvo anstataŭi gramatikan lernolibron kaj vortaron. La celo de bona ekregio de E. estas aplikado de la menciitaj lerniloj; ĉu en parolo, ĉu en skribo...

Kaj kie troviĝas la plej riĉaj fontoj ol en literaturo.

Okaze de la ĉijara literatura konferenco OSIEK (Hungario, Kondoroŝ), kies ĉeftemo estis "Hungara literaturo", mi aĉetis la libron "Steloj de Eger", (de la aŭtoro Géza Gardonyi) – kiun en E. tradukis Jozefo Horvath. Estis favoro por la partoprenantoj renkonti la tradukiston persone kaj aŭskulti lian prelegon.

La dua fonto, de hungarnaciano, estis la verkoj de Eŭgeno de Zilah. Mi elektis el du iliaj verkoj: "Vivi sur barko" kaj "Kaj kiu pravas".

De G.G. estas libro historia, de EdZ estas libroj aŭtobiografiaj; lia stilo estas karakteriza pro la ŝercumado iom nigre kolorita; mi rimarkigas tion por kompreni la temojn de specimenoj.

Mi elektis cca 20 da ili – ni diru frazoj, konstruoj, stilo-konstruktoj k.s., kiuj ŝajnis al mi ne nur interesaj, sed ankaŭ instruipovaj (instruivaj).

Koncerne ilin, mi celas jenon:

1. Ke la legantoj koncentriĝu al la verboformoj – de kiuj gramatikaj kategorioj ili devenas: verbo – v., substantivo – s., adjektivo – a., adverbo – ad.

2. Ke la legantoj traduku ilin en la ĉeĥan. Ne (nur) laŭvorte (primitive, banale) – sed *laŭsence!* En bona, bela stilo; tia, kia estas ĝuiga en la bela literaturo (beletro).

Rim.: se oni sciigos la tradukaĵojn al nia adreso, ni publikos ilin en la venonta LA; margit.turkova@email.cz

Horvath:

1. – *ĉiam kun larmobanitaj okuloj* –
2. – *kun enpeniĝa mieno – ŝi diris kun turmenta mieno* –
3. – *Dobó hufoklake pretergalopas la palacon* –
4. – *la patrino kuregas al la loko; levas sian filon; priveadas lin* –
5. – *dum minuto ambaŭ spiregas kun elorbigitaj okuloj* –
6. – *la triumfo proksimas – la triumfo proksimiĝas* –
7. – *nova fonto animas la soldatojn* –
8. – *ĉirkaŭ li alariĝis la popolo* –
9. – *proksimiĝis grasmakula kamparano*
10. – *Planden ĉiuj, kiuj vivas!!* –

Eugene de Zilah:

1. *La havenestro ne pagigis min por la lasta monato.*
2. *La vento norduesta estis bona por veladi eosten.*
3. *Konsilo de A.: "Zorgu ĉiam unue pri la ŝipo, eĉ se ci perdas la edzinon. Se la ŝipo perdiĝas, ĉio estas perdita – vivo, edzino, havaĵoj; se ci havas la ŝipon, per ĝi ci ĉiam trovos novan edzinon." Lena bonhumore ridis pri la konsilo, kiun ŝi preferis konsideri ŝerco.*
4. *Nin puŝis mola venteto uesta.*
5. *Mi prenis min por olda marhundo.*
6. *Poste sur la lito de nia kajuto ni junulumis.*
7. *Je forta suda vento la haveno ne estas eltenebla.*
8. *Endis tuj foriri.*
9. *Neprintus tuj foriri.*
10. *Nepras tuj foriri.*

Margit Turková

Zpráva vedoucího delegáta UEA pro ČR

Koncem roku 2019 je v ČR celkem 58 přímých členů UEA, z toho 3 doživotní členové a jeden čestný člen. Tento počet je téměř stabilní. Oproti roku 2018 se přihlásilo 9 nových členů, ale 10 jich své členství neobnovilo. Věřím, že někteří jen ze zapomětivosti a ještě si členství obnoví. Mohou si ho zaplatit společně s členstvím za rok 2020 a tím být i nadále členem největší a jistě i nejvýznamnější celosvětové esperantské organizace.

Po nepříjemné změně minulý rok, kdy výbor UEA musel pro nelehkou finanční situaci upravit příspěvky (zrušení kategorie MG a pro nás zvýšení příspěvků MB a MA), pro letošek alespoň k dalšímu zvýšení nedošlo a příspěvky zůstávají ve stejné výši:

Výše členského příspěvku pro rok 2020:

Kategorie MB (základní, s časopisem Esperanto elektronicky)
EUR 27.- (720 Kč)

Kategorie MA (s papírovou verzí Revuo Esperanto)
EUR 57.- (1 510 Kč)

Přímí členové UEA kat. MB a MA do 29 let včetně dostávají navíc oficiální orgán TEJO „Kontakto“.

Těm z vás, kteří jsou delegáty, ev. odbornými delegáty UEA, děkuji za tuto službu, která jistě není nijak náročná, ale jste článkem velice důležité sítě esperantistů ochotných nezištně pomoci jiným esperantistům. Jen připomínám, že není povinností delegáta ani ubytovávat esperantisty (k tomu slouží síť Pasporta servo), ani přijmout jakoukoliv prosbu

zahraničního esperantisty, která by vyžadovala vaše finanční výdaje nebo příliš vašeho času. V tom případě máte právo takovou žádost odmítnout, eventuálně žadatele upozornit, že vyhovíte, pokud Vám nahradí výdaje s tím spojené, které dohromady činí „xy“ EUR. Ale vždy je slušné odpovědět.

Současně se obracím na ty, kteří delegáty nejsou, aby uvážili zapojení se do této unikátní sítě. Ale připomínám, že zatímco členem UEA se může stát i začátečník, který se esperanto teprve začíná učit, u delegáta se předpokládá dobrá znalost jazyka.

Informace o UK 2020 v Montrealu (Kanada) 1. až 8. 8. 2020:

Zájemci, vyžádejte si přihlášku a *unuan bultenon*, pošlu jakmile je obdržím z UEA, nebo si vše můžete stáhnout už teď z <http://uea.org/kongresoj>. **Kongresový poplatek je možno platit na účet ČES do 22.12.2019**, aby byla jistota, že to stačím nahlásit do UEA do 31.12.2019 (konec první periody, po níž se poplatky citelně zvyšují: do 31. 3. na 180 – 225 – 90 – 130 EUR).

Poplatky do 22. 12. jsou pro nás (Kat. B):

1. Přímý člen UEA (kategorie MB i MA)
145 EUR (3 840 Kč)
2. Ne přímý člen UEA:
180 EUR (4 770 Kč)
3. Člen výboru UEA, mládežník*, invalida**, pokud je přímý člen UEA:
70 EUR (1 850 Kč)
4. Společník***, mládežník, invalida, ne přímý člen UEA
105 EUR (2 780 Kč)

* Mládežník: Narozený mezi 1.1.1990 a 31.12. 1999 (stejně pro mládežnice)

** Invalida: Ten, jehož účast nutně předpokládá doprovod (např. nevidomý)

*** Společník: kdo bydlí na stejné adrese s přihlášeným ad 1, ev. ad 2.

Bezplatně se přihlašují narození po 31. 12. 1999 a nezbytný doprovod přihlášeného invalidy.

Možnost platby ve prospěch UEA v Kč

Platba ve prospěch UEA v Kč (jak členství, tak i platby pro UK) prostřednictvím ČES je služba členům. Proto ji ČES poskytuje pouze svým členům.

Vzhledem k rizikům pohybu kurzu CZK/EUR jsou výše uvedené poplatky v Kč, které nevyžadují, abyste se zabývali přepočtem, platné jen do 22.12.2019. Po tomto datu použijte pro přepočet kurzu následující postup.

Aktuální kurz, v kterém budete platit na účet svazu, si spočtete tak, že sumu v EUR vynásobíte aktuálním kurzem (ČSOB deviza prodej + 0,1 Kč) podle kurzovního lístku:

<http://www.csob.cz/cz/Csob/Kurzovni-listky/Stranky/kurzovni-listek.aspx>.

V případě nejasnosti kontaktujte mne nebo pokladníka ČES Vratislava Hirše a my Vám sdělíme aktuální kurz, a tedy cenu v Kč.

Svazu platíte poštovní poukázkou A nebo převodem na účet:

2800186228/2010, variabilní symbol má celkem 10 míst – prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na obálce při expedici Starta. Další pět míst pro variabilní symbol

podle účelu platby (**06941 pro přímé členství v UEA, 06944 pro poplatek UK**).

Pokud platíte v jedné sumě i jiné platby svazu, informujte o tom (s rozpisem co, ev. za koho současně platíte) na adresu Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, e-mailem vhirsx@email.cz.

Petr Chrdle
chrdle@kava-pech.cz
736 645 455

Marie Drašnarová (* 12. 12. 1946 + ? 2019)

Ŝi loĝis kaj studis en Prago. Esperanton ŝi lernis verŝajne en iu kurso gvidata de Mikuláš Nevan en jaroj 1962 – 64 kaj tuj aktive komencis labori en tiama junulara sekcio de ĈSEK. Post la jaro 1968 Nevan foriris labori al UEA kaj multaj el praga grupo elmigris kaj Marie finis sian aktivadon. Dum preparoj de praga UK 1996 ŝi venis kunlabori kaj bone zorgis pri siaj taskoj. Profesie ŝi instruis francan kaj germanan lingvojn en altlernejoj. Ŝi ne havis propran familion, longajn jarojn ŝi vivis kun amiko Přemysl Herzán kaj dum komuna somera libertempo estis ambaŭ brutale mortigitaj.

Honoron al ilia memoro.
Pavel Polnický

P.S. Iliaj korpoj estis trovitaj en digolago Ŝvihov sur rivero Ŝelivka la 23-an kaj 24-an de oktobro 2019. Du 24-jaraj junuloj suspektataj kiel murdistoj estis kaptitaj en Butovice.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940 členství ČES
- 06941 členství UEA
- 06942 předplatné Starta bez členství
- 06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944 poplatek UK
- 06945 kongres EEU
- 50400 komise pedagogická ILEI
- 50401 písemný kurs začátečníci
- 50402 písemný kurs pokročilí
- 50404 Paroliga kurso
- 50405 svazové zkoušky
- 50800 sekce nevidomých LIBE
- 50900 sekce zdravotníků UMEA
- 51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200 sekce informatiky
- 70100 komise pro tisk a inf.
- 80200 ediční fond
- 80300 propagace v tisku
- 80400 fond Tilio
- 80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1320,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 820,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

- Allogaj nelongaj artikoloj, varia, aktuala temaro
- Bunte ilustrita, profesie pretigata
- Kreskigu vian legokapablon kaj lingvan nivelon!

Juna amiko



Internacia redakcia teamo
Rigora lingva kontrolo
Spertu la realan lingvouzon
Interkultura perspektivo
4-foje jare, perpoŝte aŭ rete.

Tarifoj: kalendara jaro 2020:

	A-landoj	B-landoj
Papera	€ 18	€ 13
Reta	€ 11	€ 7

Perantoj en 35 landoj
akceptas abonojn.

Eldonaĵo de la



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
50. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 1. 2. 2020

--

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
50-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 1. 2. 2020

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO 2019 - 2020

2019-12-20/22 Semajnfino kun opero en Prago,
Info: e-mentalprago@seznam.cz

2020-03-26-28 Lingva Seminario en Malá
Skála, Info: aeh@esperanto-aeg.eu,
drahotova@esperanto.cz

2020-07-18/26 Somera Esperanto-Studado en
Kroměříž
Retejo: ses.ikso.net



Eksterlande

2019-12-14 Zamenhof-festo en la Pola Instituto
en Vieno de la 15-a ĝis 20-a horo, por fru-
venantoj renkontiĝo jam je la 12-a h ĉe la
monumento de Zamenhof kaj sekva promeno

2020-04-06/13 La 36-a PSI - Printempa
Semajno Internacia en Wittenberg (Germanio),
Info: psi@esperanto.de

2020-05/31-06/01 Transponta German-Pola
Kongreso en Frankfurto/Oder - Słubice, Retejo:
www.esperanto.de/gek/2020
Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice
29-a de Majo – 5-a de Junio 2020

2020-05/29-06/05 La 72-IFEF-Kongreso en
Frankfurto/Oder - Słubice
Info: ifefesperanto@gmail.com

2020-08-01/08 La 105-a Universala Kongreso
de Esperanto en Montrealo (Kanado), Retejo:
www.esperanto2020.ca

2020-08-08/15 La 70-a KELI-Kongreso en
Legnica (Pollando), Info: pomer@wp.pl

Pliaj informoj en Esperanto.cz,
Eventoj.hu kaj Eventaservo.org



E-mental ĉe la asocia kongreso



Petro Chrđle kun eksterlandaj gastoj
Martin Stuppniĝ kaj Reinhard Fössmeier



Seán Ó'Riain kun Magdalena Feifiĉová



Petr Zahradník kun interpretisto Josef Vojáček
en "hlaholna" de Besední dům



Jozef Reinwart prelegas pri EU
kaj pri Esperanto kiel nemateria kultura
heredaĵo



Vanda Šípová kaj Ivan Acher
ĉe te-ceremonio en Bartošovice



Martin Stuppniĝ en la fervojista konferenco
en Kořenov salutas nome de Aŭstrio

fotoj: P. Kaščák, M. Kolka, V. Stanovský